


Eventa Servo: evoluoj kaj planoj

■ Yves Nevelsteen

Ĉu vi jam konas la evento-diskonigan servon Eventa Servo? La ŝanco ke vi aŭdis pri la servo kaj eĉ uzis ĝin, dum la pasinta jaro multe kreskis. Intertempe pli ol 1500 organizantoj de eventoj registriĝis en la retejo <https://eventaservo.org> kaj entute estas enigita pli ol 11 500 eventoj. Mi volas iom raportu pri la lastatempaj evoluoj kaj pri niaj planoj.


Antaŭ kelkaj jaroj mi persone aldonis multajn eventojn – centojn da ili; tio estis nepre bezonata por lanĉi la retejon. Kvankam mi daŭre aldonas eventojn – du aŭ tri monate – nuntempe la plej multaj organizantoj regule mem enigas eventojn. Mia tasko estas limigita al korektado de evidentaj eraroj kaj al sugestado per tiaj ĉi duonaŭtomataj mesaĝoj.

Eventa Servo <kontakto@eventaservo.org> dim. 26 jun 21:32 ☆ ↶ ⋮
 À bert.schumann ▾



Vi estas nova eventa administranto ➤

Eventa Servo <kontakto@eventaservo.org> lun. 16 mai 09:14 ☆ ↶ ⋮
 À michaela.stegmaier ▾



Ĉiufoje kiam iu registriĝas, kreas aŭ ŝanĝas eventon, alvenas mesaĝo en nia Telegram-kanalo 'ES administradoj'. Tio faciligas la kontroladon de eventoj. Regule mi ĉapeligas iksan tekston, forigas troajn majusklojn aŭ korektas evidentajn lingvajn erarojn. Ĉiufoje kiam mi ion ŝanĝas, la kreinto de la evento estas pri tio avertata. Foje mi sendas mesaĝon kun rekomendo, sen tuj mem ŝanĝi ion.

Reklamo

Mi regule proponas aldoni reklamon sur la ĉefpaĝo de Eventa Servo. Jen ekzempla mesaĝo kaj ĝia rezulto:

Saluton Tobiasz

Ĝojigas min, ke Arkones denove okazos. Tuj post kiam mi eksciis tion, mi aldonis informojn al Eventa Servo - vidu <https://eventaservo.org/e/arkones2022>.

Mi aldonis al Eventa Servo ankaŭ informojn pri E-senco; vidu <https://eventaservo.org/o/E-senco>.

Mi invitas vin registriĝi en la retejo de Eventa Servo per <https://eventaservo.org/r> - mi tiam igos vin administranto kaj vi povos ŝanĝi kaj kompletigi de mi enigita informojn laŭplaĉe.

Ĉu mi aldonu reklamon por Arkones al la ĉefpaĝo de Eventa Servo? Se tio interesas vin, bv. sendi reklambildon 400x200 px.

Amike
 Yves Nevelsteen



Plibonigoj

Regule uzantoj de la retejo donas al ni plibonigajn sugestojn. Mi notas ĉion kaj de tempo al tempo Fernando Ŝajani kaj mi retkunsidas per Zoom. Jen kelkaj ekzemploj de plibonigoj, kiujn ni konkrete planas aŭ intertempe jam realigis:

Horzonoj

La nuntempa sistemo de horzonoj estas la rezulto de plursemajna programado kaj testado – malsimplas. Uzantoj povas vidi la originalan horon kaj la lokan horon de evento; ĉar nuntempe okazas multaj retaj eventoj, koni la ekzaktan horon gravas! Ĉion eblas tamen plibonigi. Ekzemple ne havas sence dufoje aperigi la horojn, kiam ili estas samaj, kiel en ĉi tiu ekzemplo:

Kultura centro KoToPo - Lingva kaj kultura renkontiĝo: Esperanto

Neformala kaj senpaga kunveno ĉiun lastan mardon de la monato

Loka

KoToPo estas neprofitcela asocio kaj kafejo kiu celas instigi interŝanĝojn inter lingvoj kaj kulturoj de la mondo. Ĝi havas renkontiĝojn por paroli

augusto
 2022
30
 mardo

🕒 20:00 - 22:00
 Eŭropo/Parizo ✨


🕒 20:00 - 22:00
 Eŭropo/Bruselo ✨
 Ŝanĝi horzonon

Ni pripensas, ĉu nur forigi la duan mencion aŭ indiki la horzonon ‘mezeŭropa tempo’.

Bildo ĉe diskonigita evento

Kiam oni konigas eventon per socia retejo kiel Facebook aŭ Telegram, uzante la ligilon de evento, apud ĝi aperas bildo. Defaŭlte aperis la (reklam)emblemo de Eventa Servo aŭ tiu de la organizo, se ĝi estas alŝutita. Por pli efike varbi, ni aldonis trian eblon: se bildo estas alŝutita al evento, ni montros tiun (la unue alŝutitan), kaj ne plu tiun de la organizo.

Mi volas emfazi, ke eblas diskonigi eventon ekde Eventa Servo. Estas multe pli efike kaj logike unue krei eventon en Eventa Servo, kaj poste diskonigi tiun pere de Facebook, Telegram kaj alia:



Grava avantaĝo de diskonigo de evento en ĉi tiu maniero estas, ke eblas facile kaj rapide enhave ŝanĝi la eventan paĝon. Tio ne eblas, se vi sendas informojn per retmesaĝo. Kiam estas ŝanĝo, vi devas sendi novan mesaĝon. Ekstas diversaj versioj kaj regas konfuzo. Ĉar lastatempaj ŝanĝoj multe plioftiĝis, pli gravas nuntempe sendi ligilon al eventa paĝo anstataŭ informojn pri la evento.

“Mi volas partopreni” / memoriga mesaĝo

“Partoprenontoj tra Eventa Servo”: kelkaj homoj erare supozas, ke alklakante en Eventa Servo la butonon “Mi partoprenos”, ili aliĝis. Tio kompreneble ne sufiĉas, sed pluraj organizantoj de eventoj informis min, ke vere okazis problemoj pro tio. Homoj facile miskomprenas. Tial ni planas ŝanĝi tiun butonon al “Mi ŝatas” – kiel en Facebook. Kaj ni aperigos mesaĝon “Indikis interesiĝon pri ĉi tiu evento” aŭ ion tian.

Homoj kiuj alklakis la butonon “Mi volas partopreni”, nun ricevas mesaĝon du horojn antaŭ la komenco de la evento. Ĉar ne havas sencan sendi memorigan mesaĝon du horojn antaŭe kiam – ekzemple – temas pri plurtaga evento, ni estontece verŝajne sendos tri mesaĝojn: unuan 1 mo-

naton antaŭe, duan 2 semajnojn antaŭe kaj trian 1 tagon antaŭe.

Internacia kalendaro de Eventoj

Kalendaro kiu tre similas al tiu de la iama kalendaro de *Eventoj*, aperas en <https://eventaservo.org/j/2022>.

Vi povas aliri ĝin alklakante jenan butonon:



Malavantaĝo estas, ke la paĝo montras malaktualajn eventojn, krom se vi ĝin malfermas en januaro. Mi ŝatus, ke tuj estu montrata la aktuala monato. Fernando esploras, kiel tion solvi teĥnike.



Cxapelitaj literoj

Pluraj enigantoj de eventoj ilin enigis ikse. Mi proponis al Fernando aldoni butonon por konverti iksan tekston al ĉapeloj por la diversaj tekstaj kampoj (titolo, priskribo kaj enhavo). Nun mi korektas tion permane. Fernando volas aŭtomate ĉapeliĝi tekston dum registrado. Ni eksperimentos pri tio.

Sendependa fonduso

Ĉu Eventa Servo plaĉas al vi kaj vi volas subteni ĝiajn kreintojn kaj administrantojn? Iĝi membro de UEA tiam estas unua bona reflekso; la Estraro de UEA aktive subtenas nin. Se vi volas fari pli, eblas finance subteni retajn agantojn pere de Fonduso *Instigo* (<https://instigo.be>). Atenton: donacoj pere de Liberapay estas anonimaj. Se specife por Eventa Servo vi volas donaci, necesas tion sciigi al mi.

Fonduso *Instigo* funkcias kunlabore kun UEA, sed ĝi tamen estas sendependa kaj havas alian logikon ol kutimaj fondusoj: per la fonduso ni volas **danki realigintojn** de konkretaj projektoj, **instigi ilin daŭrigi** la bonan laboron kaj **detale raporti** al donacintoj.